



P. L. Travers  
Aŭstralia verkisto



# Esperanto sub la Suda Kruco

Novembro-Decembero 2004  
Numero 72 (Volumo 12, no.6)



ISSN 1039-9380

# Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio  
Numero 72 (volumo 12, numero 6), Novembro-Decembero 2004

Redaktoro: Donald Broadribb  
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio  
Telefona: (08) 9641 1937  
Faksoj: (08) 9641 1134  
E-poŝte: [sudakruco@westnet.com.au](mailto:sudakruco@westnet.com.au)

## LIBROSERVO

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio.  
E-poŝte: [libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

## KORESPONDAJ KURSOJ

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio.  
E-poŝte: [hazgreen@twmba.net](mailto:hazgreen@twmba.net)

## SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO,

### VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de Esperanto sub la Suda Kruco: "Ni vere bezonas artikolon pri ...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: [sudakruco@westnet.com.au](mailto:sudakruco@westnet.com.au); vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Ne-tajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

## SUR LA KOVRILO

Pamela Lyndon Travers (1899-1906) estis verŝajne la plej sukcesa aŭstralia verkisto de porinfanaj romanoj. Ŝia serio de ses romanoj pri Mary Poppins estas inter la plej amataj verkoj por infanoj. En 1966 Walt Disney divastigis tre popularan filmon surbaze de ŝiaj verkoj.

## EN ĈI TIU NUMERO

La azeno kaj la ŝtelistoj (Lilli Giloteaux).....	3
Recenzo: R.U.R. (rec. <a href="#">db</a> ).....	4
Nekrologo: John Harvey.....	6
Nekrologo: Peter Broadribb.....	7
Death Notice: Clara Gleeson.....	8
Radio 3ZZZ; Alvoko al AEA ĝenerala kunsido.....	9
Nova ZEO en Kanbero (Margaret Furness).....	10
For the Beginner: Jargon 4 ( <a href="#">db</a> ).....	11
La ĉeriza ĝardeno en Esperanto.....	15
Skribis la legantoj:	
Sandor Horvath.....	16
Dianne Lukes.....	17
Volo Gueltling.....	18
Ĉu esperanto forfalos en dialektojn?	
Marcel Leereveld/ <a href="#">db</a> .....	19
Urĝa voko savi Radion 3ZZZ/Dezirata korespondi.....	22
World Language Expo (Penny Vos Pym).....	23
El la regionoj.....	25
Vagabondo hejme? (Intervjuo kun Trevor Steele).....	26
Odlo Bokserp.....	29

Limdato por la januaro-februara numero: 15 decembro.


# LA AZENO KAJ LA ŜTELISTOJ

DE LILLI GILOTEAUX

Iam, en urbo Bazelo (Svislando) mi volis pentri ĉarman placon. Ĉar nenie en la ĉirkaŭaĵo troviĝis benko, mi tutsimple sidigis sur la trotuaro. Kelkajn minutojn poste, najbara komercisto afable alportis al mi seĝon. Mi ĝojis kaj povis pli komforte labori. En Islando dum malvarma julia tago mia amikino pruntedonis al mi gantojn por ekstere pentre fiksi la belecon de lago kaj montoj. Estis la unua fojo, kiam mi pentris per gantitaj manoj. Kaj dum ferio en Aŭstrio, post rompiĝo de mia dekstra pojno, mi devis daŭrigi desegni per la makdekstra mano.

En Sidnejo, mi spertis multajn agrablajn horojn pentrante, sed ankaŭ kelkajn malagrablajn. Iun matenon mi promenis al belega loko kaj komencis pentri sidante en la ombro de eŭkalipto. Subite mi sentis bestetojn sur mia nuko. Ho! Terure! Mi estis plenplena de etaj raŭpoj. Ili estis ĉie. Sur miaj haroj, brakoj, vestoj kaj kruroj. Mi fuĝis kaj necesis longa tempo por liberigi min de ĉiuj bestetoj.

Alian tagon mi pentris sur Rocky Point en Balmoral. Forta ventopuŝo faligis dikan branĉon tuj apud mi. Mi vere bonŝancis, ke ĝi ne trafis mian kapon.



Sur la hispana insulo Majorko mi piedekskursis laŭlonge de la sovaĝa marbordo. Allogis min ronda gvatturo staranta sur impona roko. Mi pene malsupreniris tra kruda rokaro ĝis la maro kaj akvarelis. Iom poste turista paro

hazarde alvenis por admiri la belan marbordan panoramon. Ili fotis (ankaŭ min) kaj ni babilis. Kiam la viro deziris reiri, la edzino petis lin atendi ĝis mi finos mian bildon. Ŝi opiniis, ke estus tro danĝere por mi, tutsole regrimpri ĝis la strato.

Multe malpli agrabla estis la travivaĵo apud rivero Arno en Florenco (Italio). Mi sidis proksime al Ponte Vecchio kaj pentris. Kiam juna viro admiris mian bildon, alia viro, komplico, ŝtelis mian fotaparaton kaj rapide fuĝis.

Amuza estis epizodo en olivarbejo. Scivolema azeno provis manĝi mian skizoblokon, kaj ne estis facile ĝin forpeli. Alifoje nigra korvo kun pinta beko timigis min. Ĝi venis tute proksime al mi. Eble ĝi pensis, ke mia farbokesto enhavas manĝaĵon.

En Ridderkerk (Nederlando) mi kolore surpaperigis apudriveran plorsalikon, aparte ĉarman. Je mia granda bedaŭro la postan tagon la arbo estis forhakita.

[El Telopeo septembro 2004]

## RECENZO

VERKIS DONALD BROADRIBB

Karel Čapek: *R.U.R. Rossumaj Universal-Robotoj*. Tradukis el la ĉeĥa Moraviaj Esperanto-Pioniroj, 1926. Elektronika libro pretigita de Franko Luin, 2002. 163 paĝoj. Senpage elutebla ĉe <http://www.esperanto.nu/eLibrejo/>.

Ĉi tiu dramo estas la fonto de la nun tutmonde uzata vorto “roboto”. Kvankam la koncepto pri robotoj ne estis inventita de Čapek, lia dramo multe influis postajn verkistojn. Ĉefe notindaj en la dramo estas pluraj temoj kiuj subite reaktualiĝis dum la ĵuspasintaj du-tri jardekoj pro la eltrovo de “artefarita inteligento”.

En la dramo, jam je la komcento, produktadas robotojn kompanio fondita de S-ro Rossum. Ili estas homformaj (ĉar kun tiu formo ili plej plaĉas estetike al aĉetantoj) maŝinoj kiuj faras diversajn taskojn. La unua provo fabriki robotojn, provo farita de la patro de Rossum, fiaskis, ĉar li klopodis kopii la biologian naturon de homo, kio montriĝis malebla. Lia filo sukcesis fabriki robotojn, ne per tia imito sed per reserĉado pri biologiaĵoj kiuj ebligas konstrui provizore vivantajn “homojn” (ili ekmalfuncias post 20 jaroj), kapablajn nutriĝi per preskaŭ io ajn, sen menso, certe sen animo, sed kapablajn enmemorigi grandajn kvantojn da scio kaj fari rutinajn taskojn. Mem inventi aŭ elpensi aŭ propravole entrepreni agon ili ne kapablas. Kaj, kompreneble, ili ne povas naski aŭ alimaniere reprodukti sin.

La robotonprodukta kompanio estas tre sukcesa, kaj vendas multajn milojn da diversaj robotoj — kaj viraspektaj kaj virinaspektaj, laŭ la estetika prefero de la aĉetanto.

Helena, filino de la prezidento de la nacio, kaj gravulo en bonintenca societo por protekti la farton kaj rajtojn de robotoj, venas al la fabriko por trovi la detalojn pri robotoj. Ŝin, kaj ŝian societon, trompas la homa aspekto kaj parolkapablo de la robotoj, kaj ŝi ne povas kredi ke ili efektive estas nur maŝinoj sen animoj.

La direktoroj de la kompanio konferencas kun Helena, kaj, neplaniĝe, Helena restas dum jaroj kun la direktoroj, kiujn ŝi tre sukcese distras.

Kompreneble, la armeoj de la diversaj nacioj trovas robotojn tre utilaj, kaj ili aĉetas centojn da miloj da ili por servi kiel soldatoj, kaj trejnigas la robotojn militi kaj mortigi homojn. Ĉu vere surprizas nin ke post kelkaj jaroj disvastiĝas la fakto ke robotoj komencas ribeli kaj minaci siajn posedantojn mem? Poste ili komencas mortigadi homojn ĝenerale, sendistinge. Kiel povis okazi tio?

Nu, Helena neniam ĉesis kredi ke “vivantaj” robotoj nepre havas animon, do kapablas morale misagi. Ŝi eĉ persvadis unu el la planantoj de la robota mekanismo entrepreni krei kvazaŭmensajn sentojn por la robotoj. Ĉu ŝi do kulpas pri la katastrofo?

Finfine la robotoj mortigas ĉiujn homojn en la mondo. Sed ili ankaŭ subite ekkonscias ke ĉar ili ne kapablas reprodukti sin, la mondo estos tute senrobota (kaj senhoma!) post nur kelkaj jaroj. La sekreto de vivo restas zorge kaŝita de la fabriko, kaj eĉ en la fabriko neniu inĝeniero konas ĉiujn detalojn, pro ĝia komplekso. Kaj...la solaj du manuskriptoj kiuj detalas la tutan procedon por produkti vivajn maŝinojn estas bruligitaj (de Helena).

Restas, je la fino de la dramo, nur unu vivanta homo. Helena mem.

Kio okazos, do? Ĉapek aludas al unu necerta ebleco. Ĉu ĝi sukcesos? La dramo finiĝas; ni, la legantoj, devas mem taksu tiun eblecon.

La elektronika libro enhavas multajn komposterarojn, kio iom ĝenas. Sed mi forte rekomendas legi ĝin. (Atentu: eblas elŝuti kaj legi la elibron; sed projekta sistemo uzita por produkti la elibron maleblas presi ĝin. Do eblas legi ĝin nur surekrane.) □



## Por Ridigi Vin



Ni semas kaj semas

Mi kuris la tutan Japanlandon (...) por prelegi kaj fondi entute 120 lokajn filinojn.  
(Sumi Yukawa // Monda Forumo 1992: 4)

Reguligo de kontoj

KASISTOSANGO

(Titolo en JEN [= Jongeren Esperanto-Nieuws] 1993: maj/jun)

[El La ondo de esperanto]

# NEKROLOGO

JOHN HARVEY 1936-2004

VERKIS SHIRLEY GRADUSSOV



La 20an de aŭgusto forpasis nia kara ligano John Harvey. Li eklernis esperanton en la vesperaj klasoj de Vera Payne antaŭ kvarono da jarcento. Kia ĝentila vigla lernanto, ankaŭ belaspekta!

Dum la mezokdekaj jaroj John iĝis libro-servisto por nia eta ligo en Okcidenta Aŭstralio. Poste li servis dum du jaroj kiel prezidanto. Tiutempe li estis policisto. Kelkajn jarojn antaŭ sia emeritiĝo, li iĝis detektivo. Ĉiam esperantisto.

La Mondkongreson en Adelajdo 1997 li ege ĝuis, kaj multe helpis la lokan komitaton en la granda "Verda kanguru-halo". Surprize kaj plezure por li estis konatiĝi tie kun geamikoj de lia plumamiko skandinavia.

Kiam pertanoj starigis la 34an AEA-kongreson en Kolegio Sankta Georgo en 2002, John refoje estis nia prezidanto. Senbrue kaj feliĉe li laboris en la fono por subteni ĉiun kaj ĉion.

Abelkulturo estis unu el liaj hobiaj, kaj mielon li ofte kunportis al niaj kunvenoj. (Fakte Alano M. havas sur sia studobreto ujon da lia bela mielo, aĉetitan ĉe pikniko en decembro 1997. Ĝi restas daŭra memorigaĵo pri John.)

Ni malofte vidis Johnon dum la lastaj monatoj, ĉar li kaj Glenys translok-iĝitis al Mandurah, kie loĝis du aŭ tri el liaj junaj familioj (kun genepoj).

Mi la lastan fojon vidis Johnon publike ĉe la Zamenhof-festo 2003 en la hejmo de D-ro Ĝo Somoĝye. Dufoje kirurgoj operaciis lian cerbon, sed finfine la kancero forrabis la vidpovon kaj la vivon.

Ĉeestis la enterigon en fora nova tombejo ĉ. 120 homoj, inter ili niaj esperantistoj John kaj Joan Massam, kaj Alano Mendelawitz. Estis terura vetero, la pluvo bombardis la teron. Ĉeestantoj preskaŭ vadis tra koto en la senvojaj senpadaj kampoj. Nemulte helpis ombreloj kaj pluvmanteloj.


Esperantistoj sendas al Glenys kaj la multenombraj familianoj sincerajn kondolencojn. Al ni en ELWA nia kapabla vigla trankvila antaŭa prezidanto ege mankas. □

# NEKROLOGO

PETER BROADRIBB (a.k.a. JAZ BROWN)

1972-2004

VERKIS DONALD BROADRIBB



Mia multe amata filo Peter (“Jaz”) subite mortis en Srilanko la 22an de septembro 2004. Li estis 31a-jara.

Peter, kies profesia pseŭdonimo estis Jaz Brown, estis komputiloprofesiulo. Li ankaŭ estis tre lerta fotografisto, kaj unu el la plej bonkoraj personoj sur nia planedo.

Jam ekde la komenco de nia revuo Esperanto sub la Suda Kruco Peter estis nia profesia konsilisto, kiu sciis solvi ĉiun teknikan problemon, kaj ankaŭ prizorgis nian interretejon.

Peter suferis pro neofta sed genetike bazita formo de deprimado, kiun ne kuracis sed ebligis ke ĝi ne superregu speciala medikamento el la MAOI-grupo.

En 2002 Peter entreprenis viziton al Srilanko, kie dum ses monatoj li multe ĝuis veturadon en la vilaĝoj kaj vilaĝetoj, por koni la homojn kaj ilian vivmanieron. Precipe li vizitis kamparajn lernejojn por rigardi edukado-sistemojn. Li sentis ke la kulturo okcidenteŭropa, amerika, kaj aŭstralazia estas tre mankohava kaj spirite mortiga.

En februaro 2003 li entreprenis instrui la anglan lingvon al junaj infanoj en insula vilaĝo korea. Tamen tiu entrepreno fiaskis, do li okcidenten iris al orienta Eŭropo, kie li loĝis plurmonate en Bulgario, Ĉeĥio, Italio, Kroatio, Rumanio, kaj Slovenio. Komence de 2004 li reiris al Srilanko, sed en junio li estis senaverte arestita en vilaĝo, kaj tenata en karcero dum pli ol tri monatoj, sen akuzo, kaj sen sia vivkonserva medikamento. Post multa strebado ni sukcesis dungi advokaton srilankan kiu persvadis tribunalon kaŭcie liberigi lin. La postan tagon, en la profunda mizero de deprimado, li mortigis sin.

Peter postlasis sian fratinnon (Chris), kiu ankaŭ estas komputiloprofesiulo, kaj sian larmoplenan patron — min mem.

Lia kadavro estis resendita al Perto kaj lia enterigo okazis en Tombejo Karrakatta la 11an de oktobro 2004. □

# DEATH NOTICE

CLARA GLEESON (1908-2004)

VERKIS ELAINE MEREDITH

Clara Gleeson was born in Melbourne in 1908.

At the age of 23, still then a single girl, she started to learn Esperanto in Melbourne. It was at the Esperanto Society that she met Alan Gleeson (born 1913). Together, they attended lessons and both became Esperantists, eventually each of them taught Esperanto in Melbourne.

Upon their marriage, 5 years later, they bought a house in Reservoir, only to decide, after some time, to purchase 3 acres of land in Yarra Junction and had a successful nursery for years.

Still both keen Esperantists, they both corresponded with many people overseas.

Esperanto was spoken frequently in our home (much to my chagrin), particularly if it was in relation to where the chocolate biscuits were hidden, or what Father Christmas would bring!

Upon retirement, Mum and Dad retired to Wonthaggi, still keeping up with correspondence and reading of Esperanto books.

Sadly, Mum, at the age of 96 passed away August 23 this year.

Dad, who is now 99, has a lovely room in residential care, in which he proudly displays his framed Esperanto (graduation?) certificate. He still reads Esperanto books and is fluent in the language.

To help him along with the loss of his dear wife, he has decided to rejoin the Esperanto Society. Both of them have had a very fulfilling life; I, as their only daughter, am most grateful for this obituary. □



## *Por Ridigi Vin*



Tendumas du viroj. Kuŝante ili rigardas la ĉielon. Diras unu el ili: “Kion vi vidas?”

“Milojn da steloj,” respondas la alia.

“Kaj kion tio signifas por vi?”

“Nu, ke inter la planedoj de la universo, ni estas bonŝancaj esti sur Tero, konsiderante la etan verŝajnecon ke troviĝas vivo sur la aliaj planedoj. Cetere, el meteorologia vidpunkto, mi opinias, ke morgaŭ estos bela, sunbrila tago. Kaj vi, kion vi pensas?”

“Mi simple konkludas, ke iu ŝtelis nian tendon.”

[El Tamen Plu julio 2004]



# RADIO 3ZZZ

## NIA AŬSTRALIA ESPERANTO-RADIO-PROGRAMO ĈIAM AŬDEBLA PER INTERRETO

Kvankam la nombro da esperantlingvaj radioprogramoj aŭskulteblaj per Interreto ebligas informiĝi pri la vidpunktoj kaj opinioj de personoj en multaj landoj — kaj ankaŭ aŭskulti (vole/nevole) la politikajn asertojn de iuj landoj — ne scias ĉiuj esperantistoj ke nia propra aŭstralia esperantolingva radio-programo unuhora aŭskulteblas ĉiam ajn dum la semajno, ĉe:

[www.radio3zzz.com.au](http://www.radio3zzz.com.au)

La vario de la enhavo — muziko, prelegoj, komentoj, intervjuoj, kulturajoj — faras ĝin interesa por ĉiuj aŭskultantoj. Kaj la lingvonivelo estas alta. Ĉiu komputilo konektita al Interreto kapablas aŭskultigi la programon, kiu estas nova ĉiusemajne. Simpla modemo sufiĉas — ne necesas “broadband” — kaj la senpaga komputil-programo RealPlayer (elŝutebla ĉe: [www.real.com](http://www.real.com)).

Krozante la mondon, ne forgesu vian propran ĉeheiman esperantolandeton!

---

## ALVOKO AL LA ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE AEA

Konforme al nia statuto, la AEA sekretario alvokas la membraron al la Ordinara Ĝenerala kunsido okazonta kadre de la tutlanda somerkursaro en Adelaide Sudŭstraliao inter dimanĉo la 9-a kaj vendredo la 21-a de januaro 2005 ĉe Lincoln College por pritrakto de jena temo:

“100 jaroj da esperanto en Aŭstraliao”

La kunveno estas por aŭskulti kaj diskuti la raportojn de la Estraro, por decidi pri la venonta agadmaniero kaj pri kotizoj de la Asocio, por elekti la oficistojn kaj Estraron por la venonta jara periodo, kaj por elekti, se necese, specialajn komisionojn.

La sekretario anoncu almenaŭ unu monaton antaŭe la Provizoran Tagordon de la kunveno. Tio signifas ke la novembro-decembra Esperanto sub la Suda Kruco prezentas la lastan opertunon disvastigi tiun informon al la membraro antaŭ la kunsido en januaro 2005.

La sekretario akceptos diversajn proponojn kaj demandojn skribe proponitajn de aliĝinta organizaĵo aŭ de du aŭ pli da membroj.

John Gallagher

[esperantojohn@bigpond.com](mailto:esperantojohn@bigpond.com) □

# NELONGAJ NOTOJ

## NOVA ZEO<sup>1</sup> EN KANBERO

DE MARGARET FURNESS

Bedaŭrinde, la plej multaj nomŝildoj de niaj esperanto-arboj en parkoj ĉirkaŭ Adelajdo malaperis.

Ni esperu, ke du novaj pli longe daŭros. Unu estas gravurita pavimero (briko) en speciala pado, en la bestoĝardeno de Adelajdo.

La dua estos apud rozarbusto en la renovigataj Ĝardenoj de la Parlamentejo en Kanbero. Bedaŭrinde la rozoj "Peace" estis jam ĉiuj menditaj, do ni elektis rozon neordinaran. Rosa viridiflora havas strangajn "florojn" (fakte, la "petaloj" estas modifiitaj folioj), kiuj unue estas verdaj, kaj poste iĝas brunaj-purpuraj. Floristoj tre ŝatas ilin. Kelkaj homoj malaprobas tiujn kolorojn, sed ĉiuj, kiuj vidas, komentas.

Nia nomŝildo diros "Internacia Esperanto Asocio Por Paco." (La tajpisto bezonis plurajn provojn por ĝuste literumi la vortojn, do mi decidis, ke streketo estus tro komplika.) La projekto-gvidanto petis mallongan priskribon pri la nomŝildoj, por ke volontulaj ĉiĉeronoj povu preparoli ilin al vizitantoj. Jen nia teksto:

Esperanto, the International Language, was invented in the late 19th century by Dr L. L. Zamenhof (the first version was released when he was still in high school). It is intended to be a second language for everyone, to improve communication between peoples, as a step towards peace. It is relatively easy to learn, being logical and phonetic, so it isn't elitist; and no country "owns" it, so it is politically neutral.

We chose *R. viridiflora* because the symbol of Esperanto is a green star.

---

Estis malfermita nova Yahoo-listo por tiuj, kiuj volonte kuiras, kaj por tiuj, kiuj volas diskuti pri receptoj, kuirarto, tradukado de receptoj, fakvortoj kaj similaj aferoj.

Se vi volas aliĝi, sendu malplanan mesaĝon al:

[kuirkлубo-subscribe@yahoogroups.com](mailto:kuirkлубo-subscribe@yahoogroups.com)

La hejmpaĝo vi trovas ĉe: <http://groups.yahoo.com/group/kuirkлубo/>.

Administranto de la listo: Dorothea Kaiser, retadreso: [donjo@link-ab](mailto:donjo@link-ab)

---

1. Zeo = Zamenhof- aŭ esperanto-objekto, publike lokita por omaĝi al Zamenhof kaj Esperanto. — [d]

# FOR THE BEGINNER

## JARGON (4)

· BY DONALD BROADRIBB

**PREPOSITION:** This is possibly the most difficult grammatical term to explain, particularly because it does not have any genuine place in Esperanto grammar. The word “preposition” means “positioned in front of”, that is, a relatively small word placed in front of another word. In many languages, the case of a noun or pronoun or adjective depends on which particular word is placed in front of it.

For example, in English we must say “I took the money from him” and not “I took the money from he”. Why? Because in English the word “from” is one of a series of words considered to be in the special category of prepositions, and words in that particular category require the pronouns that follow them be me, him, her, us, and them.<sup>1</sup>

The situation is very different in Esperanto. None of the “little words” (in other words, particles) has any effect on the case of a noun, pronoun, or adjective following it. For this reason, there is no point in continuing to use the term preposition to refer to anything in Esperanto. As with various other traditional holdovers from the study of Latin and Greek grammar, the concept of prepositions is important in the study of some languages, but irrelevant to Esperanto.

**PRONOUN:** The term pronoun means “representing a noun”.

In English the most frequent pronouns are I/me/my/mine, you/yours, he/him/his, she/her/hers, we/our/ours, they/them/their/theirs, who/whom/whose. In English each of these words is considered to be used in place of a name: either the name of a person or the name of an object.

For example, when someone says it means the name of the person speaking..

At first glance, it would appear that there is no good reason to separate out a category of words called pronouns. Unfortunately, there is one reason from which there is no escape: Pronoun words in Esperanto can indicate possession, which is not possible for any other kind of noun in the language.

First of all, the “personal pronouns”: I, you, he, she, it, we, they. In Esperanto each of these pronouns may have a added at the end, and suddenly they come to mean: mia my/mine; via your/yours; lia him/his; ŝia

---

1. Oddly, there are no special forms required in place of **you** and **it**.

her/hers; ĝia it/its; nia our/ours; ilia their/theirs; onia one's; and sia (for the meaning of sia see reflexive). Each of these may have j and/or n also added.

Confusingly, **KIU** turns into **KIES** to mean “whose”.

Please keep firmly in mind that -a shows possession only in these six instances. (See more details in the previous issue of *EPK* CONCERNING possessive.) Similarly, -es is used for this purpose only in the series of words ĈIES, ies, kies, nenies.

**REFLEXIVE:** This is a grammatical category which does not exist in English, although it does in some other languages, such as ancient Hebrew. It refers to the word **SI** with or without -a and/or -j and/or -n.

Because we have nothing similar in English, it is very difficult for English speakers to remember how to use it. Essentially, **SI** is used instead of li, ŝi, ĝi, ili or oni after a verb when the subject of the verb has been a noun or one of the pronouns li, ŝi, ĝi, oni or ili.

For example: “She gave *herself* a present” = ŜI DONIS AL SI DONACON.

JULIO CEZARO AKIRIS POR SI LA HONORON ESTI TUTVIVA DIKTATORO = “Julius Caesar got for *himself* the honor of being dictator for life”.

By and large, then, **si** means himself/herself/themselves, but **si** can NEVER be the subject of a verb. And it can NEVER be used to refer to “me” or “you” or “we”; it can only ever refer to “he/she/it/they”.

One particular problem arises for English speakers: If by mistake you use li or ŝi or ĝi, or oni or ili when the Esperanto grammatical rule says that **si** ought to be used, then the li or ŝi or ĝi, or oni or ili refers to someone else: Marinjo aĉetis donacon por si = “Mary bought a gift for *herself*”

Marinjo aĉetis donacon por ŝi = “Mary bought a gift for *her*” [that is, for somebody else].

KIU FORGESIS PAGI LA ASEKURON POR sia AŬTO? = “Who forgot to pay the insurance for *their* car?” [that is, for *their own* car].

KIU FORGESIS PAGI LA ASEKURON POR ilia AŬTO? = “Who forgot to pay the insurance for *their* car” [i.e. some *other persons'* car].

In speaking we often make these distinctions by the particular tone of voice we use. In Esperanto the distinction must be made through the use of words as well as by tone of voice.

In very complicated sentences it may not be always obvious whether **si** is to be used or not. Generally in these instances it is possible to argue either way, and you must decide for yourself which is preferable.

**SENTENCE:** Essentially this has nothing to do with grammar, but with the way

you write things down. A sentence is one or more statements ending with a full stop (.). Grammar has more to do with phrases.

**SINGULAR:** THIS HAS TO DO WITH INDICATING THAT ONLY ONE ITEM IS INVOLVED, rather than more than one. In Esperanto the simple endings -o -on -a -an refer to one item only, whereas -oj, -ojn, -aj, -ajn refer to more than one item. For example: LIBRO “a book”; LIBROJ “books”.

**There are two exceptions to this:**

The two words *vi* and *oni* may be considered to be either singular, that is, to refer to only one person, or to be plural, that is, to refer to more than one person. When they are considered to be plurals, adjectives and nouns relating to them must have a plural form: VI ESTAS MIA AMIKO = “you are my friend”; VI ESTAS MIAJ AMIKOJ = “you are my friends”; VI ESTAS VERE STULTA! = “you [one person] really are stupid!”; VI ESTAS VERE STULTAJ! = “you [more than one person] really are stupid!

**SUBJUNCTIVE:** This grammatical term does not have any place in Esperanto grammar. In Latin and Greek grammars, it had to do with certain verb forms which do not exist in Esperanto.

There are a few traces of a one time subjunctive verb form remaining in English, but not enough to warrant discussion here.

**SUFFIX:** A suffix is a word element placed between the main part of a word and the grammatical ending(s): for example, in *STUDAJO* the *aj* is a suffix; in *knabino* the *in* is a suffix.

In Esperanto there is no difference between a suffix and any other word base. *Ajo* means “a thing”; *ino* means “a female”.

The idea of a suffix may be compared with the idea of a prefix which is a word element placed at the start before the main word base. For example: in *virbovo*, which means “a bull”, the *vir* is a prefix; in *bovino* which means “a cow” the *in* is a suffix. **Bov** refers to the animal species involved.

It is not always obvious whether a word element is best used as a prefix or a suffix. One famous example is the word *bovoviro* which was originally used in Esperanto to mean “a bull”, parallel with *bovino* “a cow”. But tradition eventually came to prefer to say *virbovo* and *bovino*, and many people would now take *bovoviro* as referring to a centaur.

Every word element in Esperanto may be used as a prefix or suffix if so desired. Any list of prefixes and suffixes is the arbitrary invention on some grammarian or dictionary maker. No two such lists turn out to be exactly the same.

**TENSE:** This refers to any of various verb forms to show when an event is considered to take place. English verbs have two tenses, properly speaking, past and present. For example: “he went” (past tense) and “he goes” (present tense). Any other indication of time is made by using additional words, such as “will”, “did”, “would” “should” etc.

In Esperanto there are four verb tenses, each of which ends with *s*. Iris (past) “went”; iras (present) “goes”; iros (future) “will go”; irus (hypothetical) “would go”.

The two verb forms which do not end with *s* are not considered to be tenses: iru (imperative) “go!”; and iri (infinitive) “to go”.

Transitive: This has been discussed in detail in *ESK* 70 (Julio-Aŭgusto 2004, pp. 13-14, and you are referred to that discussion.

**VERB:** A **VERB** is a word which in Esperanto ends with *-s*, *-u*, or *-i*. (Although there are a very few words which have one of these letters as their final letter but are not verbs, for example *pli*, *plu*, *kies* and some others.) They refer to an action taking place, such things as “go”, “speak”, “see”, “falsify” = *iras*, *iri*, *iru*, *iris*, etc.; *parolas*, *paroli*, *parolu*, *parolis* etc.; *vidas*, *vidi*, *vidis*, *vidu* etc.; *falsas*, *falsi*, *falsu*, *falsis* etc. Any word base can be used as a verb by adding such an ending.

Originally Esperanto distinguished between “active” (*aktivaj*) and “in-active” (*neaktivaj*) verbs. This is discussed in the discussion of intransitive in *ESK* 70 (Julio-Aŭgusto 2004, pp. 13-14.

**VOICE:** In some languages there is a distinction between verb forms that show action towards another person/thing (active voice), action done by someone to the speaker (passive voice), done by oneself to oneself (medial voice) and others. This does not apply in English or Esperanto.

**VOWEL:** any of the letters *a*, *e*, *i*, *o* *u*, or the sounds they represent.

In English, these written letters are used to represent some 20 or more distinct sounds, depending on the dialect. The letter *a*, for example, represents very different sounds in the words “father, bad, rain.”

In Esperanto the sound of *a* in the English word “bad” does not exist. (Most non-native-English speakers consider that sound to be a variation of *e* as in “bed”.)

**WORD:** Oddly, this is one of the most confusing and ambiguous terms in all of grammar. For practical purposes, word has to do the written form of a language, and refers to a series of letters between two white spaces. Different languages have very different traditions as to just what constitutes a word. For example, in English “the land” is considered to be

two words. In Hebrew  $\Upsilon\text{ר}א\text{ו}$ , which has the same meaning, is considered to be one word. In English “I will go” is three words; in French “j’irai” is one word, same meaning. [to be continued]

---

## “LA ĈERIZA ĜARDENO” EN ESPERANTO

### ESPERANTISTA KONTRIBUO AL LA JARO DE ĈEĤOV

HALINA GORECKA

Ekde 2000 SEZONOJ ĉiujare eldonas unu ampleksan libron el la rusa klasika literaturo: Resurekto de Tolstoj (2000), Malvivaj animoj de Gogol (2001), Blankaj noktoj de Dostojevskij (2002) kaj Rusa novelaro. La 19a jarcento (2003).

Ĉi-jare aperis, okaze de la 100-a mortodato de Anton Ĉeĥov, jubilea kolekto de Anton Ĉeĥov Ĉeriza Ĝardeno. Ĝi enhavas 36 rakontojn, novelojn kaj dramojn de Ĉeĥov, inter kiuj estas jam klasikiĝintaj “Sveda alumeto”, “Dika kaj magra”, “Ĥameleono”, “Ĉevala familinomo”, “Ivaĉjo”, “Enua historio”, “La homo en ujo”, “La damo kun hundeto”, “Urso”, kaj la titola dramo “Ĉeriza ĝardeno”.

La tekstojn tradukis Aleksander Korĵenkov, Aleksej Birjulin, Viktor Kudrjavcev, Valentin Melnikov kaj aliaj elstaraj ruslandaj tradukantoj. Ilin kontroligis sep okcident-eŭropaj kompetentuloj.

Mendu la 352-paĝan libron, kiu estis lanĉita en BET-40 (Birŝtonas, Litoŭio) precize je la centa mortodato de Anton Ĉeĥov, en la libroservo de UEA aŭ ĉe via kutima libroservo kontraŭ 27 eŭroj.

Agrablan legadon!



## *Por Ridigi Vin*



“Kelnero, ĉi rostita kokido havas unu piedon pli mallongan!”

“Pri kio temas? Ĉu vi intencas danci kun ĝi aŭ manĝi ĝin?”

\* \* \*

“Kelnero, kio naĝas en mia buljono?”

“Nenio!

— Ĉu?! Sed ĝi devus esti kun makaronioj!”

Tradukis el la pola lingvo Esperantistoj el Olsztyn

[El La ondo de esperanto]



Skribis Sandor Horvath:

Jen, ŝajne simpla demando: José, hispana esperantisto demandis al mi: Kio estas la esperanta vorto por Kookaburra?

Mi kunsendas la diskuton ĝis nun. [Septembro 2004] Ĉu vi povas helpi? Plej amike, Sandor.

Kara Kani, Bone aŭdi (fakte legi) de vi. Bone ke vi kunlaboras kun Vikipedio. Do, pri "kookaburra". Mi demandis al du aliaj kaj ili konsentas kun mi ke la oficiala vorto estas DACELO. Tamen, ekzistas kanto "Kookaburra sits under the old gum tree,.." en tiu la vorto estas tradukita kiel "KUKABARO sidas en alta arbo,.." Amike, Sandor

Kara Sandor, Saluton kaj dankon pro la rapida respondo. Tamen tiu eĉ konfuzas min iome, ĉar mi vidas: 1e.— ne ĉio estas findecidita, ĉar ne aperas en PIV kaj ne estas nur unu uzo. 2e.— mi ĉiam pensis, ke la nomo de bestoj tro ligiĝas al sciencaj latinaj nomoj kaj ne tiom al nacipopolaj nomoj. 3e.— Laŭ via informo povus esti, ke DACELO estu la familio, do, tiu ridanta (D. novaeguineae kaj D. leachii almenaŭ, mi ne scias ĉu kelkaj plie) kaj kukabaro la nomo de la unua specio kiu estas la aŭstralia. Ĉu vi ŝatus laŭ tio denove demandi al viaj kolegoj? Ĉiukaze mia redakto en Vikipedio neniel estos oficiala solvo. José

Jen vortoj de Bob Felby:

Ankaŭ la diskuto pri la dacelo daŭras. José, mia hispana amiko ne estis tute kontenta kun la respondo de "dacelo".

Tio estas, ĉar li estas pli demokrata ol scienca, mi fakte gratulas lin!

La aŭstraliaj nomoj de la dacelo estas multaj, multe pli ol 44, i.a. Dacelo novaeguineae = Laughing Kookaburra aŭ Giant Kingfisher aŭ Laughing Jackass aŭ Settler's clock. Krome ankaŭ la veraj indiĝenaj nomoj devas menciati, ĉu ne? Kowburra, Kakaburri, Akkaburra, Karconbur, Kookooburru, Cowurburra, Gurgaga, Toones, Doowal, Greggoom, Gragon, Gookergaka, Krongkrong, Tarakock, Koonet, Burndigan, Wook-wook, Coarg ktp. ktp. Tiom laŭ Chisholm 1956.

Germane Jagerliet au Riesenfischer !

Do la indiĝenoj aŭstraliaj jam parolis kaj nomis la birdon Kukabur au tre simila, ĉu ne. Se oni volas sekvi la popolon, kion oni fakte devas fari, neniam sekvu la registaron, oni devus nomi ĝin Kukaburo au Kukabaro au io simila. Ralph Harry kaj Volo Gultling nomas ĝin kukaburo, ĉar tio estas indiĝena nomo !!! □



Karaj Ĉiuj Samideanoj,

Nun mi estas en Bali ĉe la domo de mia kuzo. Ekster mia fenestro estas rizaj kampoj kiuj estas plenplenaj da akvo, kaj kiuj reflektas la rizpajlsegmentajn domojn de la indiĝenoj sur la alia flanko kaj inter ili staras altaj kaj majestaj kokosarboj. Gamelona muziko tiklas miajn orelojn.

Mi nepre instruos esperanton ĉi tie kaj kreos multajn novajn esperantistojn, kiuj poste iĝos Pasportaj Servantoj, tiam vi ĉiuj povos viziti ĉi tiun belan landon kaj sperti la veran Bali-vivon, vi mem.

Bedaŭrinde, kiam mi alvenis hieraŭ mi aŭdis ke la klaso kiun mi anticipis, ja ne ekzistas. Nita, kiu diris, ke ŝi povus trovi lernantojn, estas tre okupita, ĉar ŝi estas advokato kaj havas gravan, internacian taskon, lastatempe.

Do, hodiaŭ mi trovis grupon, kiu preparos lokan festivalon por verkistoj inter la 11 kaj 17 oktobro. Ili bezonas volontulojn, do mi, kiu nun havas multe da tempo, proponis helpi ilin. Mi petis, ĉe mi povus presenti ion pri Esperanto, sed ili ne havas vakan tempon dum la tuta festivalo. Sed mi povos prepari afiŝegon kaj montri ĝin tie dum la tuta tempo. Bedaŭrinde mi ne havas iujn de la aĵoj kiujn ni uzis ĉe la Paca Konferenco en Kijoto, lastatempe. Sed mi havas sufiĉe da tempo, por fari ion por ĝi.

Se vi ne havas tempon, ne legu plu mi petas. Nur estos iom pli pri Bali kaj miaj spertaj ĉi tie.

Mia kuzo estis for posttagmeze, kiam mi telefone aŭdis pri la festivalo kaj ili invitis min al kunsido, kiu tiam estis okazanta. Mi parolis kun dungito de mia kuzo kaj li tuj diris ke li povos transporti min. Mi feliĉe akceptis ĉar la kunsido estis pli ol du kilometrojn for. Mi iris eksteren kaj li donis al mi kaskon! Jes, mi sidis malantaŭ li sur motorciklo! La unua fojon, kiun mi povas memori, ke mi rajdis sur motorciklo. Bonŝance mi povas rajdi ĉevalon, sed eĉ ne faris ĝin dum la pasintaj 30 jaroj!

Mi portis ŝtofan ĉapelon sub la kasko (mi jam rimarkis aliajn fari tion) sed kiam ni ekvojaĝis la randaĵo de la ĉapelo bloviĝis sur miajn okulojn kaj blindigis min, do mi ne povis vidi kien ni iras. Mi ne povis deteni miaj manojn de lia talio kaj li ne sufiĉe regis la anglan por ke mi diru al li pri mia problemo. Post kio al mi sentiĝis kiel horoj, ni alvenis. Mi dankis lin kaj diris, ke mi revenos hejmen taksie.

Kiam mi surstratiĝis post la kunveno li estis atendanta min!

Do, mi ordigis la kaskon tiel mi ne denove blindiĝos kaj malantaŭe rajdis hejmen. Tiam mi vidis, ke kiam li devas halti sur vojo mi ankaŭ devas mallevi mian piedon por helpi subteni la pezon de la peza motorciklo. Mi opinias, ke li neniam denove proponos porti min ien!

Mi ankaŭ devas mencii, ke Bali havas eĉ pli da aŭtoj kaj bicikloj sur la stratoj ol en Japanio kaj la stratoj estas eĉ pli malvastaj, sed neniu obeas regulojn kiel Japanoj! Kia sperto!

Nun, post vespermanĝo kun mia kuzo, Doug, ekster mia dometo, trankvileco regas. Ranoj kaj noktaj insektoj sonetas kaj motorcikloj nur zumetas en la fono. □

Skribas Volo Gueltling:

[REF. LA RECENZON DE 100 JAHRE DER ZEIT VORAU. 100 JAHRE ESPERANTO IN HAMBURG 1904-2004, EN *ESK* 70 JULIO-AŬGUSTO 2004]

Mi petas pardonon, ke mi ne aldonis la prezon por la broŝuro<sup>1</sup>, kiun mi havis en informilo de la Hamburga Esperanto-Societo. La prezo estas €5.00 plus sendokostoj.

Kutime oni skribas Esperanto per majusklo se temas pri la lingvo. Nur se temas pri la signifo de la vorto oni skribas ĝin per minusklo: esperanto = the one who hopes. La letero de la Gestapo al s-ro Bünnemann estis skribita la 22an de Septembro 1936, (ne la 28an de Februaro 1932). La letero baziĝas sur la leĝo de la 28.02.1933, (ne 1932). Adolf Hitler transprenis la regadon la 30.01.1933, (ne 1932).

Kvankiam la leĝo de malpermeso havas la daton de 1933, kelkaj esperantistoj ankoraŭ korespondis dum longa tempo. S-ro Schütt (komercisto sur paĝo 35) ricevis poŝtkarton, ke li sendu salutleteron al komunista junularkongreso en Moskvo ĉu en 1936 aŭ 1938 (mi ne plu memoras) kaj oni nomos lin honora membro de la kongreso. Li respondis per la demando, kion ili dirus se li invitus ilin al germana junularfesto de la nazioj ktp. Li ne suferis de la nazioj pro tiuj kartoj. Alia esperantisto diris al mi, ke la polico diris ke oni kolektas tiujn Esperanto-leterojn kaj kartojn en Berlino kaj tiam ili devas serĉi esperantiston por traduki kaj tio povus daŭri pli ol monaton, estus pli bone se li skribus en germana lingvo.

[KOMENTO DE LA REDAKTORO: VOLO GUELTLING PRAVAS PRI LA DATOJ. PRO KOMPOSTERARO APERIS LA DATO 1932 ANSTATAŬ 1933 EN LA RECENZO. RILATE AL LA MAJUSKLIKO DE LA VORTO ESPERANTO: ŜAJNAS AL MI STRANGE, KE NI SKRIBU LA NOMOJN DE ĈIUJ ALIAJ LINGVOJ PER MINUSKLO, KAJ MAJUSKLIKU LA NOMON DE NUR TIU UNU LINGVO.]



## Por Ridigi Vin



“Kelnero, mi volus manĝi tion, kion manĝas kliento ĉe najbara tablo.”  
“Mi provos alporti, sed mi dubas ĉu sukcesos al mi forpreni tion de li.”

\* \* \*

“Kelnero, ĉi kokido estas nur haŭto kaj ostoj!”  
“Vi pravas, mi tuj portos plumaron!”

[El La ondo de esperanto]

1. Volo Gueltling provizis la broŝuron por recenzo. — [db]

# ĈU ESPERANTO FORFALOS EN DIALEKTOJN?

DE MARCEL LEEREVELD

De fojo al fojo mi aŭdas iun diri, ke preskaŭ neniu (krom elnaskiĝa parolanto) kapablas “orgojle regi senerare iun internacian lingvon, inkluzive de esperanto” (Σ 68. p.18).

Tiuj personoj verŝajne ne konscias, pro kio la etnaj internaciaj lingvoj (greka, latina, franca, angla, kaj poste hispana, ĉina, ktp.) estas neregeblaj 100-procente, eĉ en plej multaj kazoj ne pli ol 40%. Tiu neregebleco ekzistas, ne ĉar ili estas tro malfacilaj. Teorie ĉiu persono en la mondo kapablus lerni plurajn fremdajn lingvojn ĝis preskaŭa perfekteco. Sed praktike tio ne eblas, pro du precipaj kaŭzoj: 1. la longa tempodaŭro necesa por la lernado, kaj 2. la senorda ŝanĝiĝado de la etnaj lingvoj.

Ĉar, por lerni etnan fremdan lingvon, oni bezonus tro da tempo, tial oni ne havus sufiĉan tempon por lerni multajn aliajn aferojn nek por dediĉi sin plene al elektita aŭ necesa laboro nek por entrepreni aliajn taskojn. Estas parte pro tio, ke 99% da fremdaj homoj lernintaj ekz. la anglan lingvon nur regas ĝin 50%e aŭ malpli. Tio helpas ilin por aĉeti kokakolaon, sed ne sufiĉe por decide diskuti pri gravaj problemoj.

La dua kaŭzo, ke 99% ne kapablas komplete lerni etnan fremdan lingvon, estas la daŭra kaj senorda ŝanĝiĝado de la etnaj lingvoj. Alivorte, etna lingvo ne estas fidebla (arimetiko estas, ĉar ne ŝanĝiĝas). Eĉ se iu etna lingvo el nun subite ne plu ŝanĝiĝus, ĝi estus nefidinda pro sia strukturo nuna, kiu enhavas ĉiujn antaŭajn ŝanĝiĝojn. Tio estas problema sed natura fenomeno.

Ekzistas do du kaŭzoj, kial etna fremda lingvo ne povas regati senprobleme de siaj lernantoj: ĝia longa lernotempo pro komplikeco, kaj ĝia nefidebleco pro ŝanĝado.

Se ni deziras internacian lingvon, kiu preskaŭ perfekte lerneblas de ĉiuj homoj, ĝi do devas esti rapide lernebla pro malkompliko kaj ĝi devas esti fidebla pro neŝanĝado. (Notu tamen, ke temas pri alproksimiĝo al perfekteco, neniam tute atingebla.) Multaj esperantistoj kaj ne-esperantistoj nesage pensas, ke internacia helplingvo, la dua por ĉiu persono, devas “kreski” kaj ŝanĝiĝi por esti plena kaj valora lingvo. Ili malpravas: same kiel oni ne ŝanĝas la valorojn de la nombroj kaj tial povas uzi ilin tute plene kaj fidinde en ĉiu fako, tiel same oni povas havi perfektan lingvon neŝanĝigantan. Esperanto povas esti tia: eksterordinare fidinda, kaj relative facile kaj rapide lernebla (kvankam lerni eĉ neplifaciligeblan kaj tamen altgrade riĉan kaj fidindan lingvon ne estas facila afero: oni ĝenerale bezonas multan tempon kaj seriozan studadon; lingvo mem (ĉiu) ja reprezentas tre komplikan procedon mensan.

Se oni deziras, kiel nekonscie la plejmulto el la esperantistoj deziras, havi internacian lingvon kiu ne ĉiam estas fidebla, oni allasu ke ĝi (necesese) kresku kaj komplikiĝu kaj nelogikiĝu, per granda kaj malgranda ŝanĝo de la gramatikaj reguloj, per esceptoj al tiuj reguloj, per akceptado ante necesajn neologismojn, ante homonimojn, ante plursignifecon de vortoj, do ante kreskomanieron similan al la etnaj lingvoj.

Se, kontraŭe, oni deziras, kiel nun nur kelkaj esperantistoj celas, havi fideblan kaj (relative) facile lerneblan internacian lingvon, oni decidu, ne simple ludi pri esperanto, kaj esti 100%e serioza pri la afero. Multo ja dependas de la fidebleco de internacia lingvo, eĉ “vivo kaj morto” (kion regule montras la nefidebleco de ekz. la angla lingvo).

La prezo por havi fideblan interkomunikilon estas, ke niaj verkistoj kaj poetoj (kaj vortaristoj kaj gramatikistoj) adaptu sin al tiu rigoreco; alivorte estu eĉ pli talentaj. Por sin oferi al la bonestado de la homaro.

Se ni tiel akceptos esperanton, ni same evitos ke ĝi disfalos en diversajn dialektojn; ĉu ne valora kromrezulto? □

## KELKAJ PENSOJ

DE [db]

Pripensante la ĉisupran artikolon — kun kiu mi preskaŭ 100%e akordas — mi demandis al mi pri kelkaj temoj malmulte aŭ eble eĉ neniam konsideritaj, certe ne ofte diskutataj en la nuna literaturo

Unue: ĉu la temo “internacia lingvo” signifas ekskluzive lernadon de lingvo? Kompreneble la unua generacio de lern/int/ant/oj bezonas ke la lernado estu laŭeble facila; sed la postaj generacioj, kiuj estos denaskaj parolantoj, ne bezonos “lerni” la lingvon — krom ke ĉiu bebo ja komencas lerni sian hejman lingvon dekomence, do nature. Ĉu do gravas la “facileco” de la lingvo tiam? Efektive, mi ne scias la respondon.

En la aktuala praktiko, neniu infano lernas sian hejman lingvon “perfekte”, se per tiu adverbo ni volas diri ke temas pri lingvuzo plene identa al tiu de la gepatroj.

Tamen, kiam oni ekzamenas la lingvajn erarojn de infanoj, preskaŭ senescepte ni trovas ke la “eraroj” originis pro malkonsekvenceco interne de la lernata lingvo mem. La juninfano kiu diras “I runned” anstataŭ “I ran” ja diras tion ĉar “I runned” estas formo analogia kun “I wanted” kaj la aliaj “regulaj” verboformoj; “I seen” originis en la fakto ne la “regulaj” verboj uzas saman formon por “I wanted” kaj “I have wanted”, kaj analogie “I have seen” devus esti varianto de “I seen” logike. Tiaj eraroj ja ne ekzistus se ne ekzistus la malregulaĵoj en la lingvo lernata/lernita de la juninfano. Ĉu ĉiuj lingveraroj de la juninfano simile originas? Tiu demando meritas zorgan ekspertan observadon

kaj pripensadon. Se tiel estas, do la facileco (= plena reguleco) de la lingvo gravegas, ĉar la juninfano perdas multajn tempon, bonvolon, kaj fidon, pro sia bonintenca kreado de “eraroj”.

Due: mi mem jam rimarkis, kaj menciis en artikoloj, ke la plej granda parto de la t.n. neologismoj en esperantista uzado originas en la malperfekta vortosciado de la parolanto/skribanto. Kvankam por la norma ĉiutaga esperanta lingvo (mi ne inkluzivas tre teknikajn lingvaĵojn) lernendas nur ĉirkaŭ 5000 oficialaj radikoj, verŝajne neniu esperantisto lernis ilin ĉiujn. Laŭ mia sperto kiel redaktoro, mi rimarkis ke preskaŭ ĉiuj neologismoj uzitaj de kontribuantoj originis en la fakto ke ili ne scias ke jam ekzistantaj radikoj esprimas tion, por kio ili (ofte nekonscie) kreis neologismojn.

En la ĉiutaga angla lingvo ĉiu denaska angleparolanto aktive scias uzi ĉirkaŭ 10 000 individuajn vortojn — se ni kalkulas la neregulajn formojn kiaj ran, went, kc. kiel apartaj vortojn, kaj pasive komprenas ĉirkaŭ pliajn 5000. Se do lernanto de esperanto lernus la tutan oficialan vortostokon de esperanto, la suma nombro da radikoj estus multe malpli ol la kvanto uzata en la angla, aŭ iu alia “etna” lingvo.

Plejofto, kiam Marcel aŭ mi protestas pri “misuzo” de iu vorto (ekz. krom, kiel, atendi!), tiu misuzo okazis ĉar la uzinto ne sufiĉe konas la tutan vortoprovizon oficialan.

La nombro da idiotismoj en la oficiala Esperanta lingvuzo estas negranda, kvankam ili ja ekzistas. Dank’ al, konata al, terpomo, kc. ja estas idiotismoj — same kiel eble dudeko da aliaj idiotismoj, kreitaj kaj popularigitaj de Zamenhof. Ĉu ja necesas ilin elsarki el la lingvuzo? Ni povas disputi pri tio; min interesus legi la vidpunktojn de aliaj esperantistoj (escepte de Marcel kaj mi mem, kiuj jam multfoje esprimis niajn opiniojn tiurilatajn). □



## Por Ridigi Vin



ARISTOPEDAGOGO

Koran grafulon, speciale pro la Esperanto-instruado. (U3A Ligilo 1995: 2)

LA SUDA KRUĈO

Napolo, koro de Mediteraneo kaj vojkruĉiĝo de ideoj...

Aliĝilo por la itala esperanto-kongreso, 1997)

[El La ondo de esperanto]

- 
1. Ĉar la vortaroj kutime diras ke “atendi” signifas “wait, expect”, personoj volantaj eviti miskomprenon kreis la neologismon “ekspekti” por la senco “expect”. Ili ne pripensis ke la jama esperanta vorto “anticipi” esprimas la sencon de la angla vorto “expect” en preskaŭ ĉiu tekstajo. Per sia neologismo ili nur reinventas la radon.

# URĜA VOKO SAVI RADION3ZZ- ESPERANTAJN DISSENDOJN

Dum la lastaj dudek jaroj entuziasmaj voluntuloj, kaj aparte Svetislav Kanacki, evoluigis la semajnan dissendon per esperanto el 92.3 FM ZZZ (Radio 3ZZZ). Ĝi estas nun dissendo fiera je monda nivelo. Espereble vi ĉiuj scias ke nun per [www.3zzz.com.au](http://www.3zzz.com.au) vi povas aŭskulti la dissendojn ĉie en la mondo, je iu ajn tempo. Pli junaj dissendantoj nun planas kaj prezentas la programon kaj Svetislav (preskaŭ) emeritiĝis. Multajn dankojn al ili ĉiuj.

Tamen, ĝuste nun kiam ni sukcesas, ni tre facile povos perdi la rajton dissendi. Ni estas en tre danĝera situacio!

## KION NI DEVAS FARI:

Por konservi membrecon de 3ZZZ ni devas havi almenaŭ 40 pagantajn membrojn. En la pasintaj jaroj la membraro estis plejparte el Viktorio. Kelkfoje, por gajni sufiĉajn membrojn, iu membro pagas por siaj familianoj. Se ni ne povos gajni membrojn el aliaj provincoj, tiam nia dissendogrupa ne povos daŭri.

Eble, se vi havos financon intereson en 3ZZZ, tiam vi aŭskultos kutime kaj eĉ helpos per sendi sonbendon ktp al la dissendantoj!

Membreco kostas \$15.00 (\$10.00, se vi estas pensiulo).

Pagu al 3ZZZ, P.O. Box 1106, Collingwood Vic 3066.

Aŭ, se vi preferas, pagu al Hon. Kasisto, Esperanta Grupo de 3ZZZ, 63 Kennedy Road, Somers Vic 3927.



## Dezirata Korespondi



Mi, s-ro ZHOU Zhi-Qi, ĉina esperantisto, estas preparanta Muzeon de Esperantaj Insignoj. Estos granda favoro al mi, se vi bonkore sendos al mi esperantajjn insignojn aŭ medalojn, kun klarigo pri iliaj farintoj kaj jaroj de fariĝo. Mia adreso estas:

Zhou Zhi-Qi

Lian-sheng-jie 2

Changsha, Hunan, CN-410005

Ĉinio.

E-poŝte: [ccqj198@126.com](mailto:ccqj198@126.com)

Retpaĝo: <http://www.woduhom.com/ccqj198>

# WORLD LANGUAGE EXPO

BY PENNY VOS-PYM

Esperanto is an ingenious solution to a real problem, it is a personal opportunity in line with modern values and lifestyles, it is a good news story, it is access to an overview of the world: there are many reasons why people could welcome coming to understand Esperanto! An obstacle is that today's people are products of the mass media age and they are suspicious of low-budget, small print-run ideas. There is reassurance in size and spectacle and population and in the involvement of familiar institutions.

Fortunately for us, exhibition spaces, such as museums and galleries, exist to display such spectacles and have real need of a constant supply of well produced, novel material, especially that with broad appeal. In addition, governments often support the development and display of exhibitions as a form of public education and amenity and corporate sponsors fund exhibitions for publicity.

Grant committees award grants according to a wide range of criteria, researchers can be found to find attractive data on anything, designers create appealing presentations, and exhibition spaces show and promote them: None of these need to be personally committed to the theme of the exhibition for it to be a success. It is great if they are, but the likelihood that they are not is no reason not to proceed. A few Esperantists with vision can drive the creation of our exhibition, even if other parties are only motivated by self-interest and professional desire to succeed.

Once collated, an exhibition can tour the world almost indefinitely. Doesn't it make sense, then, to create a fantastic display and then send it out to start showing the idea to people, in a form that they can trust and believe in?

(If our global network can keep the show touring, that in itself is something real about Esperanto and the people who use it!)

In order to ensure the broad appeal of the exhibition, I propose that it address Esperanto in the context of the broader theme of languages around the world.

By attending to the specific educational outcomes sought for school students, of various ages, we can make it likely that school groups will be brought to visit the exhibition. Exhibits of varying complexity and ways of interacting will encourage access and involvement by audiences of diverse sophistication and experience, and Braille texts and subtitles could be considered to include visitors with specific disabilities.

General themes proposed for the exhibition include:

1. Language and its relation to culture.
2. The existence of vast diversity in languages and dialects

3. The value of diversity, threats and protection.
4. The costs of linguistic diversity and inequity.
5. Solutions.
6. Multilingualism. advantages, disadvantages, methods and success.
7. The rise of a global culture and valuing of all peoples, the way forward.

A non-Esperantist friend of mine, Penny Davies, and I are working on an application for Commonwealth Government funding to develop and tour the exhibition around Australia. If we are successful, the exhibition will belong to AEA after the Australian tour and may be used overseas. Kay Andersen and Jonathon Moylan have agreed to contribute as translators and Dianne Lukes and Jenny Bishop are on the advisory team so far.

One thing that we know we will need for the exhibition is videotape or DVD recordings of children and adults learning and using Esperanto. We intend to use them as a resource to compile a series of minifilms about the movement which will be part of the exhibition but can also be copied and distributed to the contributors for use elsewhere in the world.

If you are interested in helping, contact me at [penivos@yahoo.com](mailto:penivos@yahoo.com) or on (02) 64923858. □



## *Por Ridigi Vin*



Baniko posedas tereneton en la kamparo, kaj forte deziras konstrui sur ĝi feridometon, sed ne havas la monrimedojn. Li konsideris la eblecon aĉeti ruldomon, kaj komencas rigardi la reklamgazetojn. Lin trafas interesa reklamo: “La Bervalva Nacia Fervojo forvendas malnovajn pasaĝervagonojn tre favorepreze”. Li informiĝas detale, kaj decidas aĉeti, do ne ruldomon sed “reldomon”.

Post kelkaj semajnoj, li invitas Krukon viziti lin en la kamparo. Bedaŭrinde, la tago estis ege pluva, sed Krukon allogas la interesa sperto dormi en fervojvagono. Sed kun mirego li konstatas ke Baniko sidas antaŭ sia vagono sub la pluvego, fumante sian pipon.

“Sed homo, vi ja tute malsekiĝos!” li krias al Baniko. “Kial vi ne sidas interne?”

“Jam de du tagoj pluvas,” klarigas Baniko. “Mi ege emis pipfumi, sed ne povas fumi interne, ĉar bedaŭrinde la Nacia Fervojo vendis al mi...vagonon por nefumantoj!”

[per Alan Mendelawitz, laŭ Telopeo majo 2004]

“Ĉu vi kredas, ke vi heredos ion de via onklino?”

“Ne, ŝi kredas je vivo post ĉi tiu, ŝi do testamentis ĉion al si mem!”

[El Tamen Plu]



# EL LA REGIONOJ

NSW: Vizito al la sidneja klubo. Kaj la 12an kaj la 14an de julio mi vizitis al Esperanto-Domo en Sidnejo.

Dum la vespero lunda, la 12a, estis esperige ke tri aliaj vizitis la klubon krom mi. La kutima laborema triopo de Margaret Chaldecott, Sid Wolifson kaj Volo Gueltling sidis ĉe la tablo (aŭ antaŭ komputilo en la kazo de Margaret), kiam mi eniris. Ili prilaboris aferojn de la Federacio kaj la Libroservo. La kutima socia klubvespero ne ofte okazas nun pro manko de partoprenantoj kaj pro la enda laboro de la administrado de Esperanto-Domo. Sed ĉifoje tri aliaj sidis ĉe la tablo. Miŝka, polino kiu lernis esperanton kiam 14-jaraĝa knabino en Pollando, kaj ŝia kunulo John. Kvankam John scipovas nur la francan lingvon, li povis kompreni iom de la esperantaj vortoj. La alia vizitanto estis Paul, korea sinjoro. Paul aliĝis al la Federacio kaj aĉetis esperantajjn lerno-librojn. Do Margaret, Sid, Volo kaj mi povis informi la vizitantojn pri esperanto kaj ni esperas ke tiuj vizitantoj revenos al la klubo por plu informiĝi kaj lerni.

Je merkredo la 14an de julio mi iris al la klubo en la mateno. Allan Dean laboris pri purigado kaj ordigado de la aferoj en Esperanto-Domo. Margaret Chaldecott prizorgis federaciajn aferojn kaj mendojn de la AEA-Libroservo. Sid Wolifson ankaŭ prizorgis aferojn de la Federacio de NSK. Li ankaŭ kunvenis kun Nicole Elsa, esperantistino kiu venas al la klubo por lerni pri la komputila sistemo kaj helpi ordigi tion. Nicole estas filino de Lucien kaj Lili Giloteaux, niaj oftaj vizitantoj francaj.

Mi povis fotokopii kaj kolekti informon pri mia historiesplora projekto por AEA.

Ne forgesu, se iu havas informon pri esperanto-klasoj, grupoj, agadoj en NSK dum la pasintaj 20 jaroj, kontaktu al mi ĉe: 50 Alagalah St, Narromine NSW 2821; aŭ [teren@ans.com.au](mailto:teren@ans.com.au). Terry Manley [el Telopeo aŭgusto 2004]



## Por Ridigi Vin



Laŭ mi, unu el la plej mal/bonaj preseraroj troviĝis en nia UK-a gazeteto, La Lumilo, helpite el longa distanco de Odlo Bokserp. “La registaro malrespektas ĉiuspecajn homajn ratojn...” [Raportis Margaret Furness]

“Similaj turismaj servoj kostas preskaŭ 100 usonajn dolorojn tage.”

(El varbilo por la 5a Internacia Himalaja Renkontiĝo 2004.)

Raportita en *ESPERANTO AKTUELL* numero 3 2004.

# VAGABONDO HEJME?

KATJA STEELE INTERVJUAS TREVOR STEELE-N

Trevor Steele venis en la mondon en nordorienta Aŭstralio kiel la unua el sep gefiloj de angla-irland-devenaj gepatroj. Lia naskiĝurbeto nomiĝas Mareeba. Sian fruan infanaĝon pasigis Trevor en diversaj arbaroj sur la altebenaĵo Atherton, poste la familio transloĝiĝis al la vilaĝo Ravenshoe. Ĉio ĉi en teritorie eta cirklo.

Sian unuan vojaĝon al fora lando faris Trevor 27-jara. Sekvis miloj da kilometroj ŝipe, aviadile, trajne, buse ... Kaj jaroj. Li kelkfoje ĉirkaŭvojaĝis la teron kaj nun estas ree en Aŭstralio. La inventaro montris, ke li estis eksterlande entute 16 jarojn kaj por pli aŭ malpli longa tempo vizitis entute 38 landojn. En 4 el ili li vidis nur la flughavenon, tra kiu li transitis, en 21 pasigis kelkajn tagojn aŭ semajnojn, kaj estis 12 landoj, kie li vivis dum monatoj aŭ jaroj.

Katja: Kio estis la pelilo instiganta vin daŭre pluiri? Ĉu via intereso pri lingvoj, la serĉado de verk:temoj, scivolo pri la mondo ...?

Trevor: Komence mi intencis fariĝi pastro kaj resti dumvive en la ĉirkaŭaĵo de Cairns. Sed demetinte la ideon pastrigi, mi nepre volis viziti Eŭropon. Jam tiam mi sentis, ke pli bone mi komprenos la kulturon hereditan de blankaj aŭstralianoj, se mi iros al ĝiaj radikoj. Mia originala ideo estis pasigi po unu jaron en Britio, Germanio kaj Francio.

K: Via unua vojo direktiĝis al Germanio. Kial ĝuste tien?

T: Ĉar mi studis la germanan kaj havis la eblon vojaĝi tien kiel interŝanĝa instruisto. La lando tiom impresis min, ke poste mi serĉis aliajn laborpostenojn. Se mi estus tiam renkontinta virinon, al kiu mi ŝatus geedziĝi, mi eble restintus en la lando por ĉiam. Tian senton mi nenie plu havis. Mia ĉefa laboro en Germanio estis kiel estro de hejmo por eksmalliberuloj (pri tio oni povas legi en Neniu ajn papilio).

K: Ĉu la jaroj en Germanio profunde influis ankaŭ vian verkaron?

T: Ne la enhavon de miaj verkoj, sed mian stilon. Mi pli bone konas la germanan literaturon ol la anglan, almenaŭ se temas pri verkoj el la jarcentoj 16a ĝis frua 20a.

K: Kaj kien vi iris post la 2½ jaroj pasigitaj en Germanio?

T: Dum unu jaro mi estis en Anglio kaj konatiĝis kun Esperanto. Tiu estis iom maltrankvila jaro, en kiu mi definitive forlasis la katolikan eklezion. La lingvolernejo Berlitz proponis al mi unu jaron en Valencio, Hispanio: tie mi pasigis poste ok monatojn, malgraŭ mia malkontento pri la organizo. Ĝuste en Hispanio mi la unuan fojon instruis per rekta metodo. El Valencio mi reiris al Germanio pro la peto de la organizo, ĉe kiu mi prizorgis eksmalliberulojn.

K: En Brazilo vi pasigis la unuan fojon unu jaron, la duan ses monatojn kaj

laste vi reiris tien por partopreni UK-n. Kiu vizito postlasis en vi la plej fortajn spurojn?

T: Vivoŝanĝa estis la unua vizito. Pro spertoj tie mi scias, ke estas nevidata mondo tute reala. Tio donis al mi trankvilan certecon, ke mia propra vivo havas sencon kaj ke mi ne simple ĉesos ekzisti, kiam mi mortos. Mi utiligis la diversajn fenomenojn spertitajn tie en Sed nur fragmento kaj en la brazila ĉapitro de Falantaj muroj.

K: Alia granda lando vizitita estis Sovetio. Kion ĝi donis al vi?

T: Sovetio provizis la plej grandan parton de la materialo por Falantaj muroj, sed ĝis nun la plej konstanta inspirfonto restas Aŭstralio, ĉar mi konscias., ke oni verku pri tio, kion oni konas aŭ povas intuiĉii. Kaj mi jam pasigis tri kvaronojn de mia vivo en Aŭstralio.

K: La sorto de la aŭstrialiaj aborigenoj ofte levigis en viaj verkoj. Vi eĉ vivis inter la aborigenoj, ĉu ne?

T: Jes, mi pasigis duonon de 1993 kaj la tutan jaron 1994 sur aborigena rezervujo kiel eduka konsilisto (en Maningrida, Norda Teritorio). La vivo inter la aborigenoj donis al mi fortajn motivojn por verki kaj mi sentas, ke ankoraŭ devos veni de mi iuj verkoj pri tiu temo.

K: Ĉu la tri jaroj pasigitaj en Litovio nenian gravan spuron lasis en vi?

T: Nur mia unua vizito, kiam Litovio estis luktanta por ekŝigi el Sovetunio, inspiris min verki. Eble mi ne havas talenton por verki pri normala vivo. Ankaŭ kiam temas pri Aŭstralio, mi verkas plej ofte pri sociaj problemoj. Ŝajnas, ke mi emas esti ne reprezentanto, sed observanto kaj kritikanto.

K: La unua fremda lando, kiun vi vizitis, estis Maŭricio. Kaj la lasta vizitita estis Hindio.

T: Post la seninspiraj jaroj en Roterdamo la vidaĵoj, odoroj, sonoj de Hindio revokis mian verkemon. Hindio superfortas ĉiun vizitanton per siaj superdimensioniaj gloroj kaj problemoj kaj probable ekskribigas ĉiun verkiston. Sed ankaŭ en la kazo de ĉi tiu lando mi verkis ne pri la grandiozaj arĥitekturo kaj skulptoarto, sed grandparte pri la malriĉeco, troa loĝateco, kaj katastrofa malpurigo de la vivmedio.

K: Kie legeblos ĉi tiuj skribaĵoj?

T: Miaj artikoloj, ĉar temas pri ili, aperos en Diverskoloro, kiun mi esperas eldonigi jam en 2004.

K: Se la spiritaĵoj fortoj tiel forte impresis vin en Brazilo, kiel vi spertis la mondkonatan spiritualecon de Hindio?

T: La faman hindan spiritualecon mi simple ne renkontis dum tiu 4-monata restado. Fakte, la plej videblaj manifestadoj de hinduismo pensigas, ke ĝiaj

adeptoj havas tre materiajn celojn: religio kaj komercio estas intime ligitaj. Sendube, oni povas penetri sub la surfacon de folkloro hinduismo por renkonti la laŭdatan spiritualecon.

K: Kiu lando donis al vi plej multon en spirita kampo?

T: Ho, Brazilo! Sen ia ajn dubo. Eble mia antaŭa speco de agnostikeco bezonis dramoplenan refuton. En Brazilo dramo estas tre reliefa parto de la vivo. Okazas tie aferoj, al kiuj vizitantoj prave donas la epiteton kulturŝoko.

K: Reveninte al via hejmlando, kion vi atendas de ĝi? Ĉu vi alcelas la spiriton de Aŭstralio aŭ ĉu viaj planoj estas pli terproksimaj?

T: La brazila epizodo de mia vivo estis absolute necesa pro la diritaj kialoj. Tamen la ĉefa leciono tie lernita estas, ke ĉie agas nevidataj spiritaĵoj. Eĉ en Aŭstralio. Konsciajn planojn mi ne havas, sed mi kredas, ke la vivo prezentos al mi novajn spertojn. La internaj indikoj estas, ke miaj jaroj de vagabondado ĉesos kaj ke mi konstruos propran neston kune kun mia edzino. Sed mia spirito, mi esperas, ankoraŭ vojaĝos.

K: Ĉu vi ne timas, ke venos enuado, grizeco?

T: Ne. Mi nun komprenas, ke spiritaĵoj ne postulas flugbileton.

K: Ĉu restas en la angulo de viaj pensoj iu de vi nevidita lando, kiun vi ŝatus iam ankoraŭ viziti?

T: Ne. Mia vojaĝemo, provizore, subsablĝis.

K: Ĉu vi povas taksii viajn spertojn nun, el la distanco de jaroj?

T: Retrospekte oni ofte multe pli bone vidas, ol kiam la aferoj okazas. Nun mi ekzemple scias, ke tiu “maltrankvila” jaro en Anglio estis ege grava: mi tiam fariĝis esperantisto. La politika maldekstreco kaj la esperantismo tre bone ŝtopis la spacon, kiu ekestis post mia definitiva forlaso de la eklezio. La universalismo, kiun mi probable ŝuldas al mia katolika edukiĝo, trovis novajn formojn.

K: Survoje vi do trovis Esperanton. Ĉu ankaŭ la naskiĝo de verkisto estis frukto de la spertoj de vagabondo?

T: Mi ĉiam volis verki, sed neniam supozis, ke mi havas ion dirindan, kio ne estis pli bone dirita en la angla. Sed mi vidis, ke esperanto estas preskaŭ virga tereno kaj mi povus diri multajn aferojn en esperanto la unuan fojon. Alivorte, se mi ne estintus esperantisto, mi ne estintus verkisto. □



## Por Ridigi Vin



En restoracio kliento diras al la kelnero:

“Dum unu horo mi jam sensukcese provas tranĉi ĉi tiun viandopecon!”

“Ne rapidu! Ni fermas restoracion je meznokto!”




# Odlo Bokserp



EN LA ANTAŬA NUMERO DE *ESK* mi klarigis pri mia foresto dum la pasintaj monatoj, pro kio multe suferegis nia amegata honoregata mondfamega neprege havendega per Interretego provizorege nepluege legegebla gazetetego. Kaj mi distris, edukis, sciigis, konigis, senŝercigis, favoris, honoris<sup>1</sup>, plendigis, misterkonfuzis, vin — kaj aliajn el vi mi sendistrigis, senedukigis, sensciigis, senkonigis, sensenŝercigis, senfavorigis, senhonarĝentigis<sup>2</sup>, sensenplendigis, senmisterkonfuzis — per mia miriga vortkonstruado.

Ĉinumere, do, mi edifas vin per fotoj de miaj plej admirataj malkovritaĵoj<sup>3</sup>. Domaĝe, mi devis lasi iliajn kolorojn en Sankta Georgo, ĉar la helikoptero ne povis levi ilian fortan pezon —



Mia lito en la hotelkelo. Ĉiam bonorda.



La granda bankedo

g



Pejzaĝo ne vidita




Ankaŭ ĉi tion mi ne vidis<sup>4</sup>

Do kiel vi facile komprenas, mia partopreno en la Unua Internacia Kungraso de Antarktikaj Polusursoj Neesperantistaj rezultigis multajn feliĉigajn memorojn, kiujn mi volonte dividus kun vi — sed pro manko de tranĉilo, mi ne faros tion.

## ✂ La mankanta tranĉilo

1. Efektive mi nur *honarĝentis*; la oro kostas tro multe, aktuale.
2. Jes ja! Vidu piednoton 1.
3. Nu, kelkaj el ili ne povis toleri la malvarmon, do ilin mi nur povis trovi.
4. Mi forgesis kunpreni mian teleskopon. Ĉu Merkuro aŭ Marso? Mi ne memoras. Aŭ eble dumebria sonĝo?



## FAMAJ NEPARENCOJ DE *Odlo Bokserp*

### **TYRANNOSAURUS REX**

Reĝo Tiranosaŭro, kuzo de la fama vortaristo Tesaŭro, regis imperion kiu etendiĝis tra granda parto de la ankoraŭ nekonata mondo tiutempa. Inter liaj plej gravaj monumentoj estas abundaj skeletoj, kiujn li postmorte afable testamentis al la ĉefaj muzeoj de la nun konata mondo. Aliaj eterne honorataj verkajoj liaj inkluzivas multajn piedsignojn. La fama angla dramisto Ŝejkspirsaŭro diskonigis rakonton pri li en sia dramo *Hamlet and Eggs*, tradukita en esperanton kun la plisimpligita titolo *Hamleto de la fama zoologo L.L. Zamenhofosaŭro*.

Reĝo Tiranosaŭro ankaŭ fariĝis filmostelulo, pro sia majstra rolado en la tutmonde akklamita filmo *Ĵurasia Parko*.

Komentis *Odlo Bokserp* pri tiu neparenco sia: “Vere li glorigis mian nomon”, kaj “La romianoj evidente misliterumis lian nomon, kio multe plezurigas min.”



## *Por Ridigi Vin*



“En via aĝo mi tre plezure studis kaj laboris...” diris patro al sia filo.

“Do, kiam tiu entuziasmo foriris de vi?” demandas la filo.

[El Antaŭen (Hispanio) jan. 2004]

KUN EBRIA KAPO

“Bonvolu diri al mi, kioma horo estas?”

“La kvina.”

“Ĉu matene aŭ vespere?”

“Matene.”

“Dankon. Kaj nur tion bonvolu ankoraŭ diri al mi, ĉu hodiaŭ matene aŭ hieraŭ matene?”

[El La ondo de esperanto]

## LA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

<http://www.esperanto.org.au>

**PREZIDANTO:** Matthew Maguire, 4 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101

**VICPREZIDANTOJ:**

Sandor Horvath, 31 Addison Rd, Black Forest, SA 5035. (08) 8297 6249

[sandor.horvath@unisa.edu.au](mailto:sandor.horvath@unisa.edu.au)

Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. [esperanto@education.mon.ash.edu.au](mailto:esperanto@education.mon.ash.edu.au)

**SEKRETARIO:** John Gallagher, 81 Lalla Rd, Lillydale Tas 7268. [esperantojohn@bigpond.com](mailto:esperantojohn@bigpond.com)

**HELPSEKRETARIO:** Henry Broadbent, 63 Kennedy Rd, Somers Vic 3927. (03) 5983 2731.

[henry\\_b@peninsula.hotkey.net.au](mailto:henry_b@peninsula.hotkey.net.au)

**KASISTO:** Stephen Pitney, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. [pitney@goldenit.net.au](mailto:pitney@goldenit.net.au)

**HELPKASISTO:** Ken Rolls, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149.

[kenjohnrolls@yahoo.com.au](mailto:kenjohnrolls@yahoo.com.au)

Kotizoj: \$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso; \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Sendu vian kotizon al la kasisto.

## LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

<http://www.esperanto.org.nz>

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: Bradley McDonald, ĉe la asocia adreso. [bradley.m@extra.co.nz](mailto:bradley.m@extra.co.nz)

Sekretario: Howard Gravatt, ĉe la asocia adreso. [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz)

Kasisto: Jackie Fox, ĉe la asocia adreso.

Kotizoj: \$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Sendu vian kotizon al la kasisto.

## ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937, 1 (08) 9641 1134.

[sudakruco@westnet.com.au](mailto:sudakruco@westnet.com.au)

Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ESK* on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *ESK*: por membroj, po \$Aŭ3.00+poŝtendokosto; por nemembroj, \$4.25+poŝtendokosto. Mendo de la Libroservo ĉe:

[libroservo@ans.com.au](mailto:libroservo@ans.com.au)

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €23,70. Pagu al la konto ael-w ĉe UEA, de la Libroservo de Aŭstralio Esperanto Asocio.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas ©2004 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu gazeto estas ©2004 de la Aŭstralio kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata

Ĉi tiu numero de *ESK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per iMac. La programo uzita estas Mellel. La tiparo uzita estas Minion Pro.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K., K.R.A.J.O.N., K.R.E.T.

Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmismoj

Nobla premiito en la fako Fuŝado

Vera Doloro, L.M.K., D.H.A.M.N.

(Lia Multsuferanta Kontrolisto, Dumviva Honora Agoklagotago-Membro Nepra)

Wholly Printed in Australia

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA, Australia

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia